

Heinrich Heine,  
En la mirinda bela Maj'

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

En la mirinda bela Maj',  
dum sin burĝonoj fendis,  
en mia kor' la amon  
mi disvolviĝi sentis.

En la mirinda bela Maj',  
dum birda tril' ne ĉesis,  
al ŝi sopiron mian  
konfide mi konfessis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 - †1976).*

*Arg-203-1082 (2010-05-26 12:08:05)*

Heinrich Heine,  
En admirinde bela maj'

*tradukita de Hans-Georg Kaiser*

En admirinde bela maj',  
dum jam burĝonoj krevis,  
jen ankaŭ miakore  
la amo sin eklevis.

En admirinde bela maj',  
dum birdotril' senbridis,  
jen mi al ŝi sopirojn,  
dezirojn, ekkonfidis.

*Traduko de la Germana poemo "Im Mai" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).*

*Arg-203-431 (2004-03-24 07:33:04)*

*La poemo troviĝas en la „Libro de la kantoj“, sekcio „Lirika intermezo“ (1822 - 1823), n-ro I. La traduko estas korektita laŭ la lasta ŝanĝo, kiun faris s-ro Hans-Georg Kaiser en 2004-03-21.*